



# SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĉikago

15 Februaro 2005

N<sup>o</sup> 5

Redaktoro: Araneo

**Adreso (provizora):**  
Esperanto Societo de Ĉikago  
p/a Viktor Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
FAX: (708) 456-2750

## Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer  
Vicprezidanto – Karlo Offutt  
Sekretario – Viktoro Pajuk  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of our Society.  
Check should be payable to:  
**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our  
**Treasurer, Charles Gunn,**  
**828 S. Ada, Chicago IL 60607**

## Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kutime kunvenoj komenciĝas je **7 PM** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

## OMAGĜE AL KENT JONES

Antaŭ unu jaro, la 3-an de Februaro ĉesis bati koro de la fervora Esperanta patrioto, animo de nia societo, karmemora sinjoro R. Kent Jones. En la Societo sub la gvido de d-ino Gertruda Novak okazis solena kunsido, dediĉita al vivo kaj agado de nia neforgesebla samideano.

Oni povas kaj rajtas diri, ke lia tuta vivo estis senĉesa batalo kontraŭ maljusteco kaj malbono pro bono, li kiel lumturo montris 'en densa mallumo' la ĝustan vojon al kompreniĝo de diverslingvaj homoj.

Kent estis unu el la fondintoj de la E-societo de Ĥikago kaj dum kelkaj jaroj li servis kiel ĝia prezidanto. Dum la longa tempo li estis ankaŭ prezidanto de la Eduka Komisiono de E-Ligo por Norda Ameriko. Kiel oficiala delegito de UEA li estis gastiganta gesamideanojn el pli ol 20 landoj de la mondo kaj lia hejmo en North Marine Drive estis plenŝtopita fare de E-libroj kaj esperantaĵoj.

Dum 26 jaroj li estis inĝeniero de la Metropola Akva Utiliga Distrikto kaj fine pensiigis en 1996. Sed antaŭ veno al Venta Urbego s-ro Jones sindone laboris por teĥasa kompanio *Convair*, kiu produktis bomb-ŝeloj por bombaviadiloj B-58. Kiam li eksciis, ke lian 'bebon' oni povas uzi por atomaj armiloj, Kent forlasis *Covair*-on kaj eklaboris por *Texas Petroleum* in Fort Worth.

Unu jaro poste la kompanio kortume procesis kontraŭ traduka eraro (en germana lingvo), okazinta pro ambiguenko de la angla. Ĝuste tiam s-ro Jones konatiĝis kun Esperanto kaj fariĝis senlaca adepto kaj advokato de la lingvo de l'Espero. Li nomis ĝin 'la metrika sistemo de lingvoj'.

Dum longa tempo nia samideano strebis anstataŭigi la oficialan lingvon de aviado – la anglan per nia kara lingvo de la Majstro. Li kolektis la tutan dosieron pri aer-katastrofoj, kaŭzigitaj de lingvaj miskomprenoj. Li estis spertulo en tiu kampo, ĉar siatempe servis kiel kontrolisto de aer-transporto.

Antaŭ la partoprenantoj de klub-kunsido elpaŝis membroj de la Societo, gastoj, E-lernantoj de s-ro Jones. Oni havis eblecon denove ekaŭdi voĉon de la kluba 'E-patro', aŭskulti rememorojn pri li, trarigardi lum-bildojn pri lia agado kaj pri sindona laboro de liaj sennombraj gastoj. Sendube, la plej bona rememoro pri Kent Jones estos realigo de liaj planoj kaj ideoj, kiuj restis post li kiel mejlŝtonoj de nia estonta agado.



Viktoro

## UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –  
Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/esp/viva/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

## Sekvantaj Kunsidoj:

**23an de Februaro** – pri E-interjekcioj raportos **Viktor Pajuk**. Lingvaj demandoj estas akceptataj laŭ tel. 773-344-2276 aŭ rete:  
araneoesp @ yahoo.co.uk

**23an de Marto** – kun sia E-verkaro konatigos nin **Gregoro Dolgin**.

**27an de Aprilo** – nia fora ano **Marko Ŝafrot** gvidos tra la mondo de Mefisto.

**27an de Majo** – temo anoncota

Unu el gastoj de s-ro Kent Jones estis la plej fama skota E-poeto, akademiano, kiun oni trifoje nomumis por Nobel-premio en literature branĉo Bill Auld. Mi mem persone konas lin, kelkfoje vizitis lian hejmon kaj per propraj okuloj vidis faman libron el 4500 E-libroj, kiun Bill ne vendis al Pitsburga Universitata biblioteko, sed pro sia patrioteco donacis al la Skota Nacia Biblioteko en Edinburgo. Inter tiuj libroj estis ankaŭ 51 verkitaj kaj tradukitaj de B. Auld mem. Kaj jen estas unu poemo, kiun sendube sciis Kent Jones.

*William AULD*

## Dumnokta aviado

Silent' – krom nur mallaŭta zumo,  
kiu l'orelojn ne molestas.

Obskur' – krom ke fantoma lumo  
en la kajuto fosforeskas.

Senmovaj ŝvebas tuŝ-proksime  
la astroj, kiel mil lampiroj.

En nova mondo mi pilgrime  
flugas en voj' de l'pioniroj...

## Ni gratulas...



membron de la Societo, s-ron Ernst Bünemann kun edzino okaze de naskiĝo de ilia unua filo Etienne. Sanon kaj feliĉon al la tuta familio!



prezidanton de la Germana Esperanto-Asocio, s-ron Andreas Emmerich kun edzino okaze de naskiĝo de ilia unua filino Elizabeta Luiza. Sanon kaj feliĉon al la tuta familio!

## Ĉu vi scias, ke...

... en la lasta pasintjara numero de l'franca periodaĵo *Norda Gazeto* aperis elukraina traduko de rakonto *Olesja*, verkita fare de renoma ukraina lingvisto kaj prozisto Boris Hrinĉenko? Sub la traduko oni povas trovi nomon de nia sekretario Viktor Pajuk. Al li – plurajn sukcesojn!

... kutime en Esperantio la lastajn tagojn de Februaro oni nomas *Semajno-n de Internacia Amikeco*? Nia glorplena urbego Ŝikago subtenas fratecajn rilatojn kun 24 (!) aliaj urboj de la mondo. Inter ili – 3 en Afriko, 6 – en Azio, 13 – en maljuna mondo, 2 – en Nord-Ameriko. Ĉu ni ne starigu kontaktojn kun la E-kolektivoj kaj individuaj samideanoj el ĝemelurboj? Bonvolu prepari proponojn pri ebla kunlaboro por la venonta klubkunsido, kiu okazos la 23-an de Februaro.

Denove kun vi estis  araneoesp @ yahoo.co.uk